The chairman of the special board of trustees to handle this undertaking is *Mr. Fred H. McMann, 45 Rankin Ave., Troy, N. Y.* The older members of EANA well remember Mr. McMann as the Chairman of Finance Committee during the successful campaign of years ago to liquidate certain financial obligations to printing firms which had accumulated during the long depression.

Those who will consider it a privilege to share in the present project are invited to write direct to Mr. McMann at the above address.

ESPERANTO EN BIBLIOTEKOJ

EANA kaj AE multe dankas al la jenaj samideanoj, kiuj tiel sindoneme helpas al la propagando de Esperanto en bibliotekoj tra la tuta lando. Kelkaj ne ankoraŭ respondis, kaj kelkaj donacis simile sed por aliaj celoj. Inter tiuj estas D-ino DeVilbiss, S-ro Dodge, kaj aliaj. Sed al ĉiuj ni tutkore dankas.

D-ro Cecil Stockard	20	E. R. Etter	2
A. S. Mellichamp	11	Sto. Andrew O'Reilly	2
A. M. Brya	10	Eliza Smith Esperanto Club	2
D-ro G. P. Ferree	10	George B. Wrenn	2
James H. Furay	10	Flora Wyman	2
Washington Esperanto Club	9	Cleveland Esperanto Club (3 yr)	1
C. H. McKinney	6	Prof. J. Tamborra (2 yr)	1
S. A. Klukowski	5	M. S. Alderton	1
F. A. Post	5	Rev. A. L. Anderson	1
Lt. J. W. Wood	5	John Bovit	1
J. H. Murray	4	Cora Fellows	1
Robert Karlson	3	Conrad Fisher	1
T/4 F. H. Sumner	3	Joseph Gamble	1
William Vathis	3	Anna Kincaid	1
W. G. Adams	2	W. A. Knox	1
C. N. Ayres	2	Los Angeles Esperanto Club	1
A. Bartosz	2	Joseph Scherer	1
D-ino L. K. Beecher	2	Herbert Smart	1
Prof. Dudley Brooks	2	John L. Spence	1
R. L. Davis	2	Helene Wolff	1

ESPERANTO - ATESTOJ

Inter tiuj kiuj ricevis esperanto-atestojn ni listigas la sekvantajn samideanojn. La Eduka Komitato de EANA sub la estrado de Profesoro Edwin L. Clarke prezentis la atestojn al la sukcesintoj:

Atesto pri Instruado

William P. Vathis New York, N. Y.

Atesto pri Kapableco

David M. Earl Miami, Florida
 Anna Kincaid Portland, Ore.
 S. A. Klukowski Milwaukee, Wis.
 R. C. Marble Kansas City, Mo.
 Jos. H. Murray Dearborn, Mich.

Atesto pri Lernado

Stuart Kittridge Hartford, Conn.
 Edna R. Murray Dearborn, Mich.

LA ESPERANTO-DOMO EN ARNHEM

W. SOLZBACHER

La nederlanda urbo Arnhem, kiu en Septembro 1944 estis centro de unu el la plej furiozaj bataloj en la milito, estas konata al la Esperantistoj en la tuta mondo kiel urbo de la Esperanto-Domo, kie la Internacia Cseh-Instituto organizis siajn kursojn por gvidantoj de Cseh-kursoj kaj kie miloj da personoj pasigis agrablan libertempon en tute Esperantista atmosfero. Kiam la radio-raportoj kaj la ĵurnaloj parolis pri la sanga batalo de Arnhem, ni ĉiuj timis pri la sorto de tiu gastema domo, kiu troviĝas iom ekster la urbo en bela parko. Ĉu bomboj kaj grenadoj detruis ĝin? Ĉu oni batalis inter la arboj, kiuj ĉirkaŭas ĝin? Ĉu ni iam retrovos ĝin en ĝia tuta alloga beleco kaj Esperantista ĉarmo? Ni ankoraŭ ne scias.

Mi vizitis la Esperanto-Domon nur unufoje, en Septembro 1931. Mi venis de internacia konferenco en Lunteren, Nederlando, kaj estis survoje al internacia ekspozicio en Bruselo, Belgujo. Mi proponis al amiko, kiu ankaŭ iris de Lunteren al Bruselo, ke ni faru la vojaĝon kune. Mi deziris pro speciala kaŭzo, ke li vizitu la Esperanto-Domon. Li estis estro de asocio, kiu organizis vesperajn kursojn. Esperanto estis unu el la lingvoj, kiujn oni instruis tie. Mia amiko estis konvinkita pri la neceseco de la Interlingvo kaj povis legi ĝin, sed li ne aktive partoprenis en la Esperanto-movado. Lia

intereso estis tute praktika. Mi parolis al li pri la Cseh-metodo de Esperanto-instruado kaj pri la Cseh-Instituto, rekomendante ke li havigu al si eksterlandan Esperanto-instruiston aŭ instruiston kiel eble plej ekzotikan. La ĵurnaloj en lia urbo kaj la publiko parolus pri la eksterlanda instruisto kaj la Cseh-metodo, kaj, se ĉio estus bone organizata, tio povus esti bonega propagando, ne nur por Esperanto, sed ankaŭ por lia asocio kaj liaj vesperaj kursoj. La ideo plaĉis al mia amiko kaj li plezure konsentis iri al Arnhem kaj diskuti la detalojn kun Pastro Andreo Cseh. Ni eĉ havis la kaŝan esperon, ke ni eble povus instigi Pastron Cseh persone, ke li donu la kurson.

La vetero estis bela, ne tro varma kaj ne tro malvarma. Ni decidis iri piede al la Esperanto-Domo. Ni promenis tra la ordaj kaj puraj stratoj de Arnhem — ĉio estas orda kaj pura en Nederlando — kaj eniris la urban informoficejon por turistoj. Fraŭlino ĝentile klarigis al ni la vojon. Ni vere ne estus bezonintaj ŝian helpon, ĉar ni trovis, ke vojmontriloj indikantaj la direkton troviĝis en multaj lokoj. Estis klare, ke la Urbo Arnhem konsideris la Esperanto-Domon grava.

Sed unue ni trovis alian Esperantistan institucion: Je la rando de la strato, proksime al rivereto, altiris nian atenton durada kovrita

ĉaro. Kvinpinta verda stelo estis pentrita sur ĝin. Vidante mian verdan stelon junulo en iom fantazia kostumo tuj komencis klarigi al ni, ke la ĉaro estas lia domo kaj ke li estas vojaĝanta ĉirkaŭ la mondon per Esperanto. Survoje li disdonas flugfoliojn, vizitas ĉiujn Esperantistojn, kies adresojn li povas havigi al si, kaj — vendas poŝtkartojn kun siaj bildo kaj biografio. Kiom da tiaj “mondvojaĝantoj” mi renkontis en mia Esperantista vivo! Mi ĉiam havis iom miksitajn sentojn pri ili. Ili certe altiras intereson al Esperanto kaj kelkfoje varbas novajn anojn al la movado. Aliflanke ili helpas krei la impreson, ke Esperantistoj estas stranguloj, iom frenezaj kaj nenormalaj homoj, kaj ke Esperanto estas lingvo por vagantoj kaj fanatikuloj diversspecaj. La fakto, ke ili vivas el la poŝoj de la Esperantistoj, faras ilin kelkfoje veraj parazitaj, kiuj malutilas al la afero.

Diskutante la bonajn kaj malbonajn aspektojn de Esperanto-propagando per tiaj primitivaj kaj romantikaj “mondvojaĝantoj”, mia amiko kaj mi atingis la Esperanto-Domon. La kontrasto estis granda. Mia amiko estis videble impresita per la fakto, ke tio estis solida, serioza, bone organizita institucio. Oni parolis ĉiam Esperante, ne nur en la kurso, sed ankaŭ dum la manĝado kaj dum privata interparolado. La domo estis tute plena, ĉar estis la tempo de grava kurso por Cseh-instruis-

toj. Pastro Cseh kaj Sinjorino Isbrücker, fondintino kaj direktorino de la Cseh-Instituto, salutis nin varme. Ni tuj partoprenis en unu el la kurskunvenoj, kie ni admiris la talenton de Andreo Cseh kaj de Sinjoro Pragano, kiu estis lia helpanto en tiu okazo.

Estas vere — mi ne deziras silenti pri tio —, ke en la parko mi aŭdis kelkajn personojn interparoli nederlandlingve. Sed antaŭ ol komenci, ili ŝtele ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ ili farus ion treege malbonan. Ili sciis, ke ili pekos kontraŭ la neskribita leĝo de tiu loko, kie Esperanto estis oficiala.

La Esperanto-Domo estis donita senpage al la Cseh-Instituto de la Urbo Arnhem, en 1929, se mi ne eraras. Ĝia riparo kaj subteno kostis multe da mono, kaj Ĝesinjoroj Isbrücker meritas la dankon de la Esperantistaro pro ilia malavareco. Devus ekzisti en la mondo multe da similaj domoj kun tute internacia kaj Esperantista atmosfero. Ilia rolo povus esti tre granda por la bona funkciado de la Esperanto-movado kaj la fina venko de la Zamenhofa lingvo kiel oficiala helpa lingvo en la internacia vivo.

Mi pensis pri la Esperanto-Domo en Arnhem, kiam mi legis antaŭ nelonge interesan artikolon de John Weighman (pri “La Lingva Problemo”) en la hispanlingva revuo “Revista Belga” (Bega Oficejo por Latin-Ameriko, New York, Julio 1944). John Weighman, kiu estas angla speci-

alisto pri franca literaturo, komence ŝajnas esti simpatia al Esperanto, kiun li prave konsideras kiel la sola serioza propono por la solvo de la Interlingva problemo. Fine li tamen venas al negativa konkludo, dirante ke oni devos daŭrigi lerni multajn naciajn linvojn. Kial? John Weighman diras: "Esperanto devus komence esti uzata kiel helpa lingvo kaj tial havus en la cerbo de ĉiu persono ekziston malpli vivantan kaj klaran ol la gepatra lingvo. Ekzistas kaŭzoj por dubi, ĉu iu lingvo povas prosperi, se ĝi ne estas la unua kaj komuna lingvo de granda nombro da personoj. Eble la latina lingvo estas bona ekzemplo por ilustration. Kiam ĝi estis la baza lingvo de pensantoj kaj poetoj, kiuj uzis ĝin, ĝi estis vivanta lingvo. Kiam ĝi estis transformita en helpan esprimilon kaj komencis esti uzata kune kun nacia lingvo, ĝi malfortiĝis kaj fine malaperis".

Sinjoro Weighman ne estas tute malprava, sed li ne sufiĉe konas la Esperanto-movadon. Estas vere, ke lingvo, kiu estus nur

teknika kodo por praktika internacia interkomunikado, ne estus "vivanta" lingvo. Ĉiu lingvo, eĉ Esperanto, bezonas "popolon", kiu uzas ĝin konstante, ĉiutage, por ĉiuj kaj ĉiaj bezonoj. Tiu popolo ne bezonas vivi en unu kompakta regiono, sed povas esti disigita tra la mondo. Kiam Esperanto estos ĝenerale uzata en la internacia vivo, ĝi estos por milionoj da personoj nur praktika instrumento uzota kiam necese. Multaj personoj uzos ĝin nur malofte kaj eble ne tre elegante. Sed centmiloj da personoj kaj miloj da oficejoj, kies laboro estas esence internacia, uzos ĝin ĉiutage, ne kiel dua lingvo, sed kiel unua. Por prepari tiun tempon, institucioj kiel la Esperanto-Domo en Arnhem ludas gravan rolon, ne nur kiel centroj por intensa, efika, moderna, grandskala instruado kaj ekzercado de Esperanto-instruistoj, sed ankaŭ kiel vivcentroj de la movado. Se Esperanto volas fariĝi la dua lingvo por ĉiuj, ĝi bezonas kelkajn lokojn, kie ĝi estas la unua lingvo, ne nur en certaj specialaj okazoj, sed ĉiam.

PASTRO KAO EN SUDAMERIKO

La eminenta ĉina Esperantisto, Pastro D-ro J. B. Kao, O. F. M., prenis aeroplanon je la 20-a de Novembro por flugi al Venezuelo kaj al 17 aliaj landoj de Sudameriko. Lia vojaĝo daŭros ok monatojn. La ĉina registaro faris lin Membro de la Ĉina Helpa Komitato por militviktimoj.

Pastro Kao fariĝis Esperantisto en Ĉinujo en 1926. En 1930 li iris al Eŭropo por studi en Romo, Italujo,

kaj Lille kaj Paris, Francujo. Li doktoriĝis en Francujo. En 1938 li venis al Usono. Li ofte atentigis pri Esperanto en siaj paroladoj, intervjuoj kun ĵurnalistoj, kaj artikoloj. Li parolas multajn lingvojn, ne nur la ĉinan kaj la anglan, sed ankaŭ la italan, francan, hispanan, portugalan, latinan kaj rusan. La legantoj de "Amerika Esperantisto" atendas liajn vojaĝraportojn el Sudameriko.

PORTUGALA EKSKURSO

CARLOS ISIDORO DE JESUS

Frumatene la Esperantistoj komencas ariĝi en la stacidomo. Mistera sento ilin pelis tien — la sopiro kunvivi dum tuta tago la senkomparan fratecon, kiun estigas la lingvo Esperanto. Verda flagego saĝe metita sur vagono-fenestro milde moviĝante kunvokas al si la samideanaron. Tien ili svarmas allogate. Tie — ili scias — vojaĝos la verdaj ekskursantoj.

La vagonaro ekveturas. De unu al alia ekstremo de la vagono kruciĝas esperantaj sonoj je la mirego de la ceteraj pasaĝeroj. Fratama sento ŝvebas super niaj kapoj. Ĝi flugas reciproke de fraŭlo al fraŭlino, de maljunulo al junulo, de viro al virino — ĝi flugas de *homo* al *homo*!

Ni alvenas en Agualva. Samideano Ferreira Alves jam atende staras en la stacidomo. Ni salutas lin. Kriojn — vivu-ojn al Esperanto, hura-ojn! Ni turnas nin al la bieno, kiun tiu samideano afablege disponigis por ni. Estas babilado, Esperanto-kantado, kaj ridado. Jen la bieno! Ni nun serĉu oportunan lokon por restadi. Jen ĝi, proksime al tiu aro da arboj. Ĉiu surplankigas sian pakajon. Kelkaj malsataj jam ekmanĝas. Sportemuloj jam ludas per pilko. Aliaj ripozas sternitaj sur la herbaro. Plenaĝuloj parolas serioze pri io grava. Gejunuloj senzorge babiladas, aŭdigante ĝojan ridegadon.

Nun, post la tagmezo, la solenaĵo alproksimiĝas. La samideanoj kunvenas. Kiom da personoj? Sepdek! Preskaŭ kongreso! Ekstarante, ĉiuj kantas la himnon "La Espero". Solena momento! La muzik-notoj ekoe resonas en niaj koroj, vekante pli varman amon al *la Homaro*. Kiel bone, esti Esperantisto!

Samideano Cordeiro eklegas sian saluton al la grupo. Elkoran bondeziron kaj bonvenon. Sinceraj vortoj montrantaj amon al Esperanto, plenan komprenon pri nia ideo. Sekvas la Zamenhofa versaĵo, "Preĝo sub la verda standardo". Ni sentas ke la sole neco pliampleksiĝas. Ĉiuj streĉas la aŭdpovon kaj senteme aŭskultas ĝin. Poste, seriozuloj legas proprajn artikolojn. Kaj ridemuloj rakontas anekdotojn. Refoje versaĵoj: "La Vojo", "Al la Fratoj" kaj "Mia Penso". Kaj tiel la programo sekvas — agrabla, interesa, plena je Esperantaj sentoj. Vere ĉiuj sentas sin "anoj de la granda homaro".

Fine, la letervespero. 25 leteroj ricevitaĵ. Dezirojn por plensukceso kaj plezuro al la ekskursantoj de diversaj samideanoj, kore bedaŭrantaj ne povi interfratiĝi kun ni. Jes, vera interfratiĝo ĝi estas. Pala, malgrandega bildo de la estonta socio interfratigata. La solenaĵo ĉesas per komuna kanto de la Esperanta Himno.

Ludoj komenciĝas. Manon ĉe mano ni runde ĉirkaŭiras. Brue ni ridas, babilas — kaj ni nur bedaŭras ke la tago estas tiel mallonga. Sed jam estas tempo por foriri. La suno jam subiras kaj ni foriras kun la suno. Ho, la suno! Ja, la sama suno kiu ĵus lumigis fratan Esperantistan rondon, tuj disĵetos la samajn radiojn al kانونoj, tankoj kaj armeoj. Kiel sarkasme! Kiel bedaŭrinde! Malrapide ni paŝas al la stacidomo. La arboj kaj la floroj restas. . . . Sed ni foriras kun la konscienco trankvila kaj pensata, pri plenumo de *devo* la plej *sankta*!

Aŭgusto 1944.
Lisbono, Port.

DEZIRAS KORESPONDI: "AE" nun starigas fakon pri interkorespondado. Ni konsilas ke vi partoprenu por helpi al ĝenerala propagando, financa subteno de "AE", kaj vi mem per Esperanto-ekzerco kaj interkonatiĝo.

MALLONGA HISTORIO DE ESPERANTO

VERKITA DE ERNEST DODGE

(*Daŭrigo*)

Redaktista Noto: Jen estas la tria parto el historia serio pri Esperanto, en kvar sinsekvaj partoj.



KVINA PERIODO

1914-1920

Se ne ekestus la granda milito, okazus en Parizo en aŭgusto, 1914, la plej granda Esperanto-Kongreso el ĉiuj. Entute 3,700 partoprenantoj enregistris sin. Sed precize kiam ili estis survoje al Parizo, eksplodis la milito. Kaj nur penpene povis la survojaj Esperantistoj reveni hejmen.

De 1914 ĝis 1918 ĝenerala laboro *por* Esperanto estis preskaŭ nulo. La milito estis ĉio. Daŭre aperadis nur la unu gazeto, "Esperanto", en Svislando. Tamen laboro *per* Esperanto estis rimarkinde sukcesa. Samideano samideanon ofte helpis savi el danĝero. La oficejo de U.E.A. en Ĝenevo funkciadis por ricevi kaj ekspedi leterojn inter diverslandaj Esperantistoj. Kelkfoje 300 leterojn en unu tago. Entute 200,000 leterojn. Notinda estas ankaŭ la fakto ke la franca kaj germana registaroj ambaŭ eldonis en Esperanto propagandan materialon, por pravigi siajn agojn.

Kvankam publikigo de libroj kaj gazetoj ĝenerale ĉesis, literatura laboro ne ĉesis. D-ro Zamenhof en 1917, nur kelkajn semajnojn antaŭ morto, finis sian

noblan tradukon de la Malnova Testamento. Lia amiko Grabowski komencis tradukon de la pola epopeo, Sinjoro Tadeo, kaj poste finis ĝin.

Post la milithaltigo, fidelaj samideanoj malgrandskale rekomencis laboron por restarigi organizojn, klasojn, gazetojn, kunvenojn. Sed restarigo estis malfacila. Homaj fortoj elĉerpiĝis. Multaj ĉefgvidantoj de la movado estis mortintaj. Ĉie kaoso. Fine, en 1920, okazis la unua postmilita Universala Kongreso de Esperanto. Sed nur 400 partoprenantoj. Bedaŭrinda kontrasto je la 3,700 celintaj Parizon en 1914.



SESA PERIODO

1920-1926

Denove la movado ekfloris kaj grandskale progresis. Novaj gazetoj. Novaj libroj. Multa lernado. Aperis novaj tre talentaj verkistoj en multaj landoj,—verkistoj tiel eminentaj, kiel estas Baghy, Kalocsay, Szilagyi, Engholm, Jean Forge, Hilda Dresen, Haefker, Schwartz, Bulthuis, Jung, Newell, kaj aliaj.

Fondiĝis en 1920 la unua *ĉiu-semajna* Esperanta gazeto, "Esperanto Triumfonta", poste renomita "Heroldo de Esperanto".

En tiu periodo okazis por unua fojo, ke agado por Esperanto estis

iniciata de instancoj neesperantistaj, kiuj senpartie celadis plibonigon de interhomaj rilatoj per adopto de internacia helplingvo. Bedaŭrinde ne elvenis tiomo el tio, kiom oni povus esperi—same kiel nek la Ligo de Nacioj nek aliaj paccelantaj klopodoj malebligis la nunan militegon! Tamen la faktoj estas sufiĉe signifoplenaj.

Ekzemple, en 1920 Ĝenerala Kongreso de la Tutmonda Unio de Internaciaj Asocioj diskutis, kiel kandidatojn por internacia uzo, la lingvojn franca, Esperanta, Ida, kaj Esperantida. (Tiu lasta estis tiam propono por kompromiso inter Esperanto kaj Ido.) La kongreso decidis favore al Esperanto, kun nur unu kontraŭa voĉo — kiu preferis la francan lingvon. Estis aliaj okazintaĵoj sufiĉe similaj.

En 1920 kaj 1921 la Ligo de Nacioj interesis sin pri la lingva problemo. Komitato de la Ligo faris longan reporton tute favoran al Esperanto. Ĝi proponis ke ĉiuj nacioj enkonduku Esperanton en lernejojn kiel devigan kurson. Tragike bedaŭrinde estas, ke tiam Francujo estis sub reakcia registaro. La franca delegitaro ĉe la Ligo de Nacioj estis respondeca

por la rifuzo de la Ligo adopti la favoran raporton de sia komitato en la originala formo, kiu rekomendis devigan instruadon de Esperanto en ĉiuj landoj. Tamen la Internacia Labor-Oficejo, starigita sub la Ligo, favoris Esperanton kaj ofte uzis ĝin.

Unuvorte, oni povas konstati ke la periodo 1920-26 vidis progreson de Esperanto en diversaj kampoj — turisma, scienca, literatura, ktp. Kaj komencon de ĝia uzo en radiotelefonio. Du plenumitaĵoj de la jaro 1926 staras, ĉe fino de tiu ĉi periodo, kiel grandaj mejloŝtonoj sur la vojo de Esperanta progreso. En 1926 la bela traduko Esperanta de la Sankta Biblio estis presita, kaj solene dediĉita en la katedralo de Edinburgo. Kaj en 1926 la Universala Telegrafa Unio decidis ke Esperanto estas "klara lingvo", kaj ĝi ordonis ke Esperanto estu la *sola* lingvo (krom la latina) kiun la lokaj telegrafaj administracioj en ĉiuj landoj de la tergloba devas akcepti por uzo en telegrafado. La permeso telegrafi per ĉiu nacia lingvo estos aŭ malestos, laŭ plaĉo de lokaj instancoj. Sed permeso uzi Esperanton estas deviga.

(Daŭrigota)

"Esperanto Pavimas la Vojon al Internacia Amikeco"

S-ro Robert Karlson, Vic-Delegito de IEL, Montrealo, Kanado, verkis tre efikan propagandilon en la formo de leteroj sendataj al konatuloj, edukistoj, ĵurnalistoj, pastroj, registaraj instancoj, k.t.p. Li sendas du foliojn — Esperantan kaj anglan — kun la sama temo Esperanto. Li tre lerte kaj digne

priskribas la interlingvon en numeritaj paragrafoj kiuj instigas al lernado de Esperanto. Li presas kaj subskribas ĝin sub lia persona leterkapo, kaj promesas pluan helpon kaj informon al interesatoj. Ni konsilas ĉiun Esperantiston provi tiun klopodon en simila altgrada maniero.

POEMO DE PASTRO FURAY

La poemo, "Post Dolor", de Pastro Henry Beeman Furay, S. J., estis presita antaŭ naŭ jaroj en la "Antologio de Poezio de la Kolegio Sankta Kruco", kun antaŭparolo de Profesoro William Lyons Phelps.

AFTER PAIN

After pain there is a rush of gladness,
Upthrust of earth that under snow has lain;
The kerneled peace within the shell of sadness
Is reached and relished deeply after pain.

A blue sky and it with black clouds spattered,
The sunset's candle smothered out in rain,
A man's eyes, with his hope in friendship shattered,
Have kinship in a common mother, Pain.

Those born of her shall know the way thereafter
To cherish weakness and despise disdain,
For some have broken hearts and some have laughter,
But all have understanding after pain.

Original: *Rev. Henry Furay, S. J.*

POST DOLOR'

Post dolor' ekfluo de ĝojeco venas —
Leviĝ' de kuŝa ter' puŝanta neĝon for;
La ŝelo de malĝojo paco-kernon tenas,
Trovitan kaj ĝuitan funde post dolor'.

Bluĉiel', kaj ĝi kun nigraj nub-makuloj;
La sunsubir-kandelo sub la pluvo-plor';
Rompita amikec' videbla en okuloj;
Parencoj ĉiuj en komun-patrin', Dolor'.

Naskitoj ŝiaj ĉiam poste konos vojon,
Por ami mildon, teni malestimon for;
Iuj havas kor-angoron, iuj koran ĝojon,
Sed ĉiuj havas komprenemon post dolor'.

Traduko: *G. Alan Connor*

Nia tre ŝatata samideano James H. Furay, Vic-Prezidanto de la Unio de Pres-Asocioj, estas la patro de Pastro Henry Beeman Furay, S. J., kies bela poemo troviĝas supre. S-ro Furay skribis jene: "Via traduko plezurigas min, kaj mi volus aldoni ke ĝi ekscitas mian admiron. . . . Ŝajnas al mi ke la frazoj esprimas la originalan sencon precize, kaj konservas la poezian figuradon." Ni dankas al S-ro Furay kiu tiel laŭdeme taksas nian modestan penon, kaj ŝatus respondi ke li mem bonege skribas esperante.

RECENZANGULO . . . Ĉirkaŭ *La Mondo*", libret-serio. Kolekto da artikoloj verkitaĵ de Prof. Agostinho Da Silva kaj tradukitaĵ de diversaj portugalaj samideanoj. Eldonis: Manuel De Freitas, Porto, Portugalujo. Paĝoj, 22. Ricevitaj: "*La Lasta Vojaĝo de Scott*," "*La Kastoroj*," "*Vivo kaj Morto de Sokrato*," kaj "*La Araneoj*".

Depost la militkomenco malmulte da informo pri la esperanto-movada venis al ni de Portugalujo. Ŝajne, publika laboro por nia afero ne estis permesita. Sed pruvo ke la portugalaj tamen sukcesis en siaj laborklopodoj atingis nin en la formo de la supremenciitaj libretoj, eldonitaj en '42, '43 kaj '44. La subtitolo de tiuj-ĉi libretoj diras: "kulturinformaj tekstoj por la junularo". Kiel oni povas rimarki, la temoj estas plej diversaj.

Se plaĉas al iu pri zoologio, tiam rekomenindaj estas la libretoj pri la vivo, kaj morto, de energiaj kastoroj kaj la nebelaj araneoj. Leginte pri la vojaĝo de Scott al la Suda Poluso, ni memoriĝas pri la multmultaj danĝeroj kaj suferoj de Scott kaj liaj kunuloj, kiuj perdis la vivojn en tiu kuraĝa kaj sindona laborado. Ni relegas kun intereso la vojaĝoj de la belgo, Piccard, supren en la stratosferon. Kaj fine, prezentigas al ni kelkaj detaloj koncerne tiu fama greka filozofo kiu vivis kaj instruis antaŭ du mil jaroj — Sokrato. Tiun libreton mi opinias la plej bone verkitan.

Resume, la libretoj taŭgas, ne sole por la junularo, sed ankaŭ por plenaĝuloj. Bedaŭrinde, ili estas malgrandaj, kun 22 al 30 paĝoj. Espereble ili pligrandiĝos estonte. En letero al tiu-ĉi recenzisto, la eldonisto de la libretoj, Manuel de Freitas, sciigas ke li planas "biografian serio-librojn kun pli ol 100 paĝoj, pri Franklin, Lincoln, Washington kaj Zola." Bone! Ni atendu ilin.

— William P. Vathis.

THE GREEN STAR (La Verda Stelo) estas nova libro pri Esperanto verkita de *Joseph W. Dubin*. I aŭtoro informas nin ke ĝi nun estas en la presejo. La kosto estos \$2.50 bindita kaj plenformata kun 276 paĝoj. La "AE" recenzos la libron en posta numero.

★ ★ ★

James H. Morrison, Kalifornio, proponas ke la Amerika Esperantisto pri su adresaron de la Esperanto-societo en la paĝoj de la ĵurnalo. Tiamaniere la esperantistaro povus kontakti kaj interrilati reciproke. Por efektiviĝi planon, kaj helpi al la financa stato de "AE" li sugestas ke ĉiu societo pagu por la enlistigo. La redaktisto inviti la societojn pritrakti la proponon.

NEKROLOGO

FRED RIVERS, pioniro de Esperanto, mortis en Oktobro, 1944, sia hejmo ĉe la "Bay District" en Kalifornio. Letero de Berkeley, Kalifornio, sciigas nin (pere de liaj kamaradoj John Spence kaj Fred Wharf) ke Fred Rivers troviĝis morta en lito ŝajne de kormalsano. Li lasas filinojn kiuj loĝas en la orienta parto de Usono. Li lasas ankaŭ multajn artikolojn kaj samideanojn kiujn li havis pro sia aminda karaktero.

Intimaj amikoj de Fred konis ankaŭ kiel "Amiko Willis", ĉar unue nomiĝis Willis McCall. Sed kiel *Fred Rivers* li longe ĝuis la kunecon de multaj bonaj kunuloj. Krom intereso en Esperanto li subtenis aliajn bonajn aferojn. La kooperativa movado ankaŭ ricevis lian intereson. Fred Rivers estis ĵurnalisto dum multaj jaroj. La Esperantistoj de la Pacifika Marbordo funebras lin. La tuta Usona Esperantistaro perdis fervoran batalanton por nia afero.

Esperanto-Oficejo nun funkcias en Peoria, Illinois, sub la gvidado de *S-ro A. S. Mellichamp*. En ĝi troviĝas informiloj, ekspozicio de Esperantaj libroj kaj la afabla samideano kiu disponas je sia tempo por diskonigi la interlingvon. *S-ro Mellichamp* estas unu el niaj plej helpemaj samideanoj — li ankaŭ ĵus fariĝis dumviva membro de EANA!

Eliza Emery Smith, Elmiro, Nov-Jorko, raportas pri vigla intereso pri Esperanto inter la junuloj de la *Esperanto-Klubo de Elmiro*. Meritplena farado estas la disdono de bele presitaj sorbkartoj kun tre taŭga kaj helpema teksto, kiujn presis *S-ro E. B. Billings, Jr.*, ankaŭ de Elmiro.

Nia fervora Vic-Prezidanto de EA NA, *F-ino Roan Orloff*, raportis vigan agadon por Esperanto en diversaj lokoj. Ŝi parolis al granda grupo de studentoj kaj geinstruistoj en New Haven, Orange kaj Hamden, Conn. Oni intervjuis ŝin ĉe radio-stacio WELI en New Haven dum dek minutoj pasintan septembron. Ŝi gvidas Cseh-kurson kaj infankurson ĉe la Bah'i Centro.

"En la nomo de la Respubliko de Polando mi honorigas la nomon de *D-ro Zamenhof*, kreinto de Esperanto, pro lia kontribuo al la idealo de interfrateco homa". Per tiuj vortoj salutis *S-ro Sylwin Strakacz*, Konsulo de Polando, la kunvenon de la Klubo Harmonio en Nov-Jorko, Decembro la 2-an. Oni celebris la datrevenon de la naskiĝtago de *D-ro Zamenhof*. Ankaŭ parolis la bone konata psikologo, *D-ro A. A. Brill* pri siaj spertoj en la Esperanto-movado en fruaj tagoj. La Orkestro de Mandolinoj de la ILGWU, en kiu troviĝas *F-ino Agnes Cervello*, distris per bela muziko. *S-ro Henry Nagin*, Prezidanto de la Klubo estris la kunvenon kaj kelkaj aliaj samideanoj partoprenis pri la festa programo.

Geedziĝoj Esperantistaj — Ofte okazas ke Esperantistoj renkontintaj en amika rondo, lernantaj Esperanton kune, baldaŭ edziĝas kaj fariĝas Esperantista paro. Inter novaĵoj tiaj en Usono ni povas rakonti jene: *F-ino Vesta Petersen* (el Bruklino) kaj *S-ro Gunnar Spant* (el Svedujo) renkontiĝis ĉe Esperanto-klaso. Pasis du-tri jaroj, kaj *S-ro Spant*, kies laboro devigis lin vojaĝi sur la maro dum la milito, estis torpedita. Kvar tagojn li vagis en malgranda boato sur la malamika oceano, kaj fine li atingis, tute neatendite, la havenon de Nov-Jorko. Postnelonge, li kaj *Vesta* geedziĝis. Pasintan julion nova Esperantistino, *Berit Christina Spant*, naskiĝis en la hejmo. La infano jam enlistiĝis kiel Denaska Esperantisto. — Pasintan jaron, geedziĝis en Nov-Jorko *F-ino Dolores Catinell* kaj *Leŭtenanto Victor Gudla* (nun ie en Eŭropo). Ili estis kursanoj en la Cseh-klaso de *S-ino Doris Connor*. — *F-ino Helene Wolff* en Kalifornio informis nin ke du el ŝiaj klasanoj, *F-ino Eleanor Broyles*, Asistantino de la Unua Metodista Preĝejo, kaj *S-ro Leonard Hunting*, Direktoro de la Junulara Ruĝa Kruco geedziĝis la 13-an de Aŭgusto.

Nova Esperantista Oficiro inter la Militmaristaro estas *Joseph Gamble*. Antaŭe li estis inĝeniero ĉe *Sperry Gyroscope Kompanio*, kaj nun li okupas sin pri tiu mirinda, nova aparato "Radar".

Samideano F. A. Post, entuziasma Esperantisto de multaj jaroj, ĉiam tre energie laboras por Esperanto. Li faris ses duonhorajn paroladojn pri la Esperanta movado antaŭ ses klasoj de Altlernejo en North Little Rock, Arkansas. Li ankaŭ interesis *S-ino Bernie Babcock*, estrino de la Muzeo de Natura Historio. Ŝi nun diligente studas Esperanton. Li sciigis nin ke la Esperanto-Rondo aĉetis diskojn de la Linguaphone-Kompanio por perfektigi en Esperanto.

La Esperantistoj Hispanaj de Nov-Jorko, kies agema prezidanto estas S-ro Floreal Conchado, kreis grandan intereson pri Esperanto en hispanlingvaj rondoj. La sukcesa festo de la 19a de Novembro, kiu estis anoncita per radio-stacio WBYN dum tuta semajno, kaj la belega 32-paĝa broŝuro presita por la festo faris fortan impreson. S-ro Conchado baldaŭ komencos Esperanto-kurson. 12 lernontoj jam enskribiĝis. La semajna gazeto "España Libre" nun publikigas serion de artikoloj pri Esperanto, de Generalo Julio Mangada Rosenoern, famkonata hispana Esperantisto, nun rifuĝinto en Meksiko. La gazeto estas favora al Esperanto.

La bela broŝuro de la "Esperantistas Hispánicos de Nueva York" (Esperantistoj Hispanaj de Nov-Jorko) entenas 14 bonegajn artikolojn pri Esperanto kaj la Ligo de Nacioj, Panamerikanismo kaj Esperantismo, Esperanto kaj Muziko, Esperanto kaj Filmo, Esperanto kaj Framasonismo, la Universala Kongreso de Esperanto, kaj pri la Esperanto-Movado en Hispanujo, Argentino, Brazilo, Ĉinujo, Germanujo, Jugoslavujo, Soveta Rusujo. Tutpaĝa anonco pri "Amerika Esperantisto" kaj alia tutpaĝa anonco pri la kvin Esperanto-grupoj nun ekzistantaj en Nov-Jorko estas sendube tre utilaj. Kelkaj el la artikoloj (6 el la 14 estas verkitaj de Generalo Mangada) meritis esti presitaj ankaŭ en aliaj lingvoj.

Radio-paroladeto pri Esperanto en hispana lingvo, kun kelkaj vortoj en Esperanto, okazis la 15an de Novembro en radio-stacio WBYN, Brooklyn. D-ro W. Solzbacher paroladis en la programo "La Voĉo de Batalanta Hispanujo". La estro de la programo, S-ro Santiago Grevi, prezentis la parolanton, laŭdante la Esperanto-movadon. Ankaŭ tiu sukceso estas ŝuldata al la persista propagando de S-ro Floreal Conchado.

DEZIRAS KORESPONDI

Anoncetoj pri korespondado el Usono kaj Kanado kostas 75 cendojn por 25 vortoj. El aliaj landoj, ĉar estas nun malfacile sendi monon, AE akceptas anoncosepage. La redaktoro rezervas al si rajton ĉesigi tiun privilegion je iu tempo.

Svedujo. S-ro Kurt Lindstroem, Andersberg, deziras korespondi pri ĉiuj temoj per leteroj kaj poŝtkartoj. Intensiĝas poŝtmarkojn.

Irlando. Katolikaj Esperantistoj deziras korespondi kun katolikoj ĉiuj landoj. Skribu al Lorcan O'Uigin "Sonas", Mount Anville Road, Dunrum, Co. Dublin.

Portugalujo. Profesoro Jose Bigot de Almeida, Sabugal (Guarda), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn aer-komunike memorigajn.

Argentino. S-ro Andreo Morei Sosa, Jose Cubas 3543, Villa Devot Buenos Aires, deziras korespondi pri diversaj temoj.

Egiptujo. Grupo da Fraŭlinoj kiuj nun studas Esperanton deziras korespondi kun aliaj landoj: Nation YWCA, Esperanto Fako, 6 Sharia Khalig el Nasiri, Faggalah, Cairo.

Brazilo. S-ro Diderot Freitas, Rua Barao de Uba, 170 terreo, Rio de Janeiro, deziras korespondi kun gesamdeanoj en la tuta mondo. Li estas 25-jara medicina studento.

S-ro Luiz Teixeira Silva, Rua Saturnino de Padua 435, Lavras Minas, estas 20-jara komerca desegnisto, kiuj deziras korespondi.

S-ro M. Rodrigues Monteiro, Caixa Postal 1329, Sao Paulo, interesiĝas pri la popolmuziko de Ameriko kaj deziras interŝanĝi pri tiu temo.

Anglujo. S-ro A. Corre, 46 Rutland Park Mansions, Willesden Green London, N.W. 2, deziras korespondi pri sciencaj temoj. Li estas 13-jaraĝa.

S-ro Ben Cohen, 245 Romford Street London, E. 1., 25-jara serĉas korespondanton.

ESPERANTO BOOKS

Uncertain transportation makes it difficult to get books from Europe or South America, and our orders are filled in small lots. If your order is not filled within 48 hours, it is because we are waiting for shipments.

PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, Ivy Kellerman-Reed. A favorite all over the world for many years. For class or self-instruction	.75c
ESPERANTO HOME STUDENT, by James Robbie. Splendid for class or self-study. Pocket size and a favorite with the service men in camps	.25c
PRACTICAL ESPERANTO, by Wm. S. Benson. For self-instruction. It is unique with its 650 illustrations	.25c
UNIVERSALA ESPERANTO METODO, by Dr. Wm. S. Benson. This book is a wonder. "The only book of its kind in the world." 11,000 pictures. Two full-page tables of the pronunciation of the Esperanto alphabet in 36 languages. Correlatives in 35 languages. Complete index. 555 pages	\$4.00
AMERICAN POCKET DICTIONARY, by Carl Froding. 80 pages of Esperanto-English and English-Esperanto. An indispensable little pocket companion	.30c
ESTU PRETA, by George J. Falgier. A splendid <i>key</i> , with grammar, and considerable fundamental teaching	.10c
"LA ESPERO," Esperanto Song. Words and Music. Double sheet 8 x 11. Every Esperantist should have it. Sung at all Esperanto meetings	.15c or 2 for .25c
"LA VOJO." Esperanto Song. Single sheet. With translation.	.10c or 3 for .25c
EDINBURGH DICTIONARY. A world favorite. English-Esperanto and Esperanto-English. 288 pages	\$1.00
STEP BY STEP IN ESPERANTO, by M. C. Butler. One of the world's best.	
	Paper covers .75c
DICTIONARIES. Just received, Millidge \$3.50,	Fulcher & Long \$2.50
STARS. No more of the metal stars, advertised in some text-books, due to priorities.	
INDIAN BEAD STARS, white bead background with green star in center	.45c
HOME STUDENT RECORDS—made in Europe. No more available.	
"LIFE OF ZAMENHOF" (English) \$1.00. "VIVO DE ZAMENHOF" (Esperanto)	\$1.25
"ESPERANTO INTERNACIA", by Ann E. Beatty. Over 300 hymns, original Esperanto and translations of well-known English hymns	.45c
"ESPERO" and "NAPOLAJ NOKTOJ". Songs on 10 in. Record	\$1.00

YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership, with "American Esperantist". \$2.00 per year. And if you also wish membership in the International Esperanto League, with the *Jarlibro* (Yearbook Encyclopedia of Esperanto Activities), \$3.00. For the "Esperanto Internacia" (all-Esperanto official organ of I. E. L.) add \$1.00 to either of these memberships. Total for all above, \$4.00.

I..... Date.....

apply for membership in the Esperanto Association of North America, and enclose subscription (indicate class and amount)

.....

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

1410 H St., N. W., Washington, 5, D. C.

Extract from the Report of the League of Nations on Esperanto, 1922: The following paragraphs, from page twenty-six of the Report, are especially significant in connection with present discussions of "freedom of information" and "people-to-people interchange."

"The report that we have received from ministries of public education. . . . Several of these reports insist upon the great moral influence exercised on the children by correspondence with school children of other countries and by the use of Esperanto, which develops their interest in foreign nations, their taste for geography and history, and often even a spirit of international service and of human solidarity, regarding which remarkable examples have been communicated to us. Many teachers make use of the Esperanto lesson to make the children interested in the League of Nations. . . ."

"The Oriental delegates pointed out that Esperanto provided the pupils in their countries with a simplified type of European language which gave them a key to understanding the others. A young Chinese could learn Esperanto in two years, while he needed six to learn English and still longer to learn French. Students sent to the Franco-Chinese Institute at Lyons, knowing nothing but Esperanto, very quickly learnt French."

Esperanto is the living interlanguage created for interchange of thought between peoples of different national languages — not to take the place of their mother tongues.